

INFORMACIJE

INFORMOJ

Leto / jaro 16, št. / n-ro 3

december / decembro 2011

Uvodnik

Številki na pot

Uvodnik

Druga letošnja dvojna številka *Informacij / Informoj* je vsebinsko kar bogata, saj prikazuje uspešno dejavnost članov ZES in ETD v zadnjem polletju. Za objavo smo pridobili tako strokovne kot leposlovne prispevke domačih in tujih avtorjev. Poročamo predvsem o tradicionalnem srečanju ob Zamenhofovem dnevu, v strokovni rubriki ponujamo zanimivo razpravo o razvoju esperanta kot živega jezika, v leposlovni rubriki pa poezijo v originalu in prevodih. Dovolite da ob koncu leta vsem članom in somišljenikom zaželimo vesele praznike ter obilo zdravja in zadovoljstva v letu 2012. *IO ZES*

Iz dejavnosti
ZES

Zamenhofov dan

Zamenhofov dan 2011

ZES in ETD sta organizirala proslavo s krajšim kulturnim programom in druženje ob 90. obletnici esperantskega društva v Ljubljani, ob 152. obletnici rojstva L.L. Zamenhova ter v počastitev dneva človekovih pravic v soboto, 10. decembra ob 10. uri v dvorani na Štefanovi 11 v Ljubljani.

Ker so vabilo v esperantu prejeli le uporabniki interneta, ga še pred poročilom o samem dogodku tu ponavljamo še za ostale člane:

SLOVENIA ESPERANTO-LIGO kaj ESPERANTA
TURISMA SOCIETO LJUBLJANA

INVITO

Slovenia Esperanto-ligo kaj Esperanta turisma societo Ljubljana invitas al la celebros kaj kuniĝo okazos de la 90-a datreveno de la organizita esperanta movado en Ljubljana, de la 152-a datreveno de la naskiĝo de L.L. Zamenhof kaj al honorigo de la Tago de homaj rajtoj

sabaton, la 10-an de decembro 2011 je la 10-a horo en la salono en la strato Štefanova 11, Ljubljana.

Jen la programo, kiun kunligos Anka Vozlič:

1. Esperantista himno *La espero* – saksofonas Simon Urh
2. Tago de homaj rajtoj – alparolo de Janez Jug
3. 90 jaroj da organizita Esperanta movado en Ljubljana – prezentas Nika Rožej
4. Solena transdono de distingo por longjara laboro en ETS Ljubljana al Fani Rižnar
5. Svetlana Makarovič: *Kaĉa (Serpento)* – esperantigis kaj deklamas Tomaž Longyka
6. Hungara popolokanto, esperanta teksto Paŭlo Balkanyi: *Hundo estas bona besto* – kantas Tomaž Urh akompanata gitare de Simon Urh
7. Marjeta Longyka: *Pri pasjeh peĉinah (Ĉe la Danĝeraj rokoj)* - esperantigis kaj deklamas Tomaž Longyka
8. Marjeta Longyka: *Vĉasih poboŝam kako drevo (Foje mi karesas iun arbon)* - esperantigis kaj deklamas Tomaž Longyka
9. Marjeta kaj Tomaž Longyka: *Osemnajsterokraka zvezda (Dekokpinta stelo)* - esperantigis kaj deklamas Tomaž Longyka
10. Poŝtmarkojn de ETS Ljubljana okaze de la 90-a datreveno de la organizita esperanta movado en Ljubljana prezentas Ostoj Kristan.

La renkontiĝon ni daŭrigos per libera diskutado, kun iĝado, manĝetado kaj babilado. Eblos ankaŭ aĉeti esperantan literaturon el la stoko de la Slovenia Esperanto-ligo kaj la jubileajn poŝtmarkojn de ETS Ljubljana.

Ni afable invitas ĉiujn membrojn de Esperantaj organizaĵoj kaj samideanojn el Slovenujo kaj el najbaraj landoj. Bonvolu inviti ankaŭ viajn geamikojn kaj gekolegojn kaj tiujn, kiuj eble ne scios pri nia invito.

Ljubljana, la 1-an de decembro 2011

Slovenia Esperanto-ligo
Prezidanto:
mag. Janez Jug

ETS Ljubljana
Prezidantino:
Nika Rožej

Ob prihodu v večjo od dveh dvoranic na Štefanovi 11 so udeleženci prejeli ovojnicu z vabilom, besedilom esperantske in evropske himne ter kompletom osebnih poŝtnih znamk ETD. Za naše razmere je bila udeležba odlična: 27 oseb, od tega 17 odraslih članov ZES in ETD, 6 gostov iz tržaškega društva in 4 otroci.

Program, ki ga je povezovala Anka Vozlič, se je začel s himno *La espero*, ki jo je na saksofonu zaigral Simon Urh. Do zadnjega nismo vedeli, katero uglasbitev je

Simon izbral za svoje glasbilo. Že prvi toni pa so izdali koračnico, ki jo je skomponiral že v začetku prejšnjega stoletja Félicien Menu de Menil in je najpogosteje izvajana od štirih poznanih uglasbitev. De Menil je bil navdušen in aktiven somišljjenik esperantskega gibanja v svojem času.

O zgodovini in vlogi esperantskega gibanja tudi v luči zagotavljanja človekovih pravic, med katerimi je jezikovna enakopravnost ena od osnovnih in bistvenih, je v esperantu govoril predsednik ZES Janez Jug.



glasil, družabne aktivnosti z množično udeležbo ter veliko število udeležencev tečajev esperanta, ter nemalo kriz zaradi medsebojnih nesoglasij, upravnih ovir ter



Janez Jug med pozdravnim nagovorom

fašistične okupacije. Zadnja teh kriz je leta 2002 skoraj dokončala življenjsko pot društva, ki je sicer po zaslugi peščice članov preživel, a utrpelo veliko materialno škodo in izgubo dragocenega arhivskega gradiva. Svoj prispevek je govnica zaključila z nekaj trajno veljavnimi prodornimi mislimi dveh nekdanjih vidnih slovenskih esperantistov prof. Rudolfa Rakuše in dr. Stanislava Škrabca.



Nika Rožej bere svoje poročilo v esperantu

Predvidena podelitev častnega priznanja gospe Fani Rižnar je odpadla, ker je slavljenka odklonila udeležbo pri tem slovesnem dejanju. O vsebini priznanja in nje-govi likovni rešitvi lahko preberete več v rubriki *Iz de-javnosti ETD* v tej številki Informacij.

Kulturni del programa je začel Tomaž Longyka z recitacijo pesmi Svetlane Makarovič: *Kača / Serpento* v originalu in v lastnem prevodu v esperanto.



$\frac{3}{4}$ družine Urh poje, mati Anka je napovedala pesem

Za pristrčni intermezzo so madžarsko ljudsko pesmico na esperantsko besedilo Paŭla Balkányja *Hundo estas bona besto* skupaj zapeli trije člani družine Urh, na kitari je spremljal oče Simon.

Zaključni del kulturnega programa so tvorile tri krajše pesmi avtorjev Marjete in Tomaža Longyke, ki jih je Tomaž občuteno recital v slovenščini in esperantu. Tem je dodal še znano Goethejevo pesem *Wanderers Nachtlied* in svoja prevoda v slovenščino in esperanto. Besedila in podrobnejši podatki o avtorstvu so prikazani v *Leposlovnem kotičku* te številke Informacij.

V zadnji točki programa je Ostoj Kristan predstavil zasnovu, oblikovanje in izvedbo osebnih poštних znamk ETD Ljubljana, izdanih ob 90. obletnici društva. Več o tej temi v rubriki *Iz dejavnosti ETD* v tej številki Informacij.



Predsednici ETD in TEA Rožej in Ackermann

Zaključno besedo v uradnem delu so imeli gostje iz Trsta, ki so pripravili knjižna darila in spominsko diplo-mo za prireditelje. Predsednica TEA gospa Edvige Ackermann je v krajšem govoru pozdravila oživelu sodelovanje med društvoma in izrazila najboljše želje za razvoj esperantskega gibanja v Sloveniji in za intenzivno sodelovanje bližnjih sosedov.



Zamenhofov dan 2011: Razgovor ob polni mizi

Neformalni in družabni del srečanja je minil v klepetu in obujanju spominov. Miza v manjši dvoranci se sicer ni šibila pod goro hrane, a je vsakdo našel kaj za svoj okus, saj so bile določene delikatese in sladice iz doma-

če kuhinje. Terana nismo pustili niti kapljice! Tudi znamke in knjige so šle dobro v promet, za znamke bo gotovo potrebno ponaročilo. Prav tako so nekateri vplačali članarino ZES, ker je bil blagajnik ravno pri roki. O.K.

Fondo de Esperanta klubo Ljubljana antaŭ 90 jaroj

Zvonimir Bernot, partopreninta la 13-an Universalan kongreson de Esperanto en Praha en la jaro 1921, ekkonis la strukturon de esperantista organizo kaj decidis transplanti la aferon ankaŭ al slovenoj. Verŝajne ne koninta la antaŭmilitan agadon de Koser, D.ro Haas kaj Štupar, li kunvokis aron da samideanoj de socialdemokrata partio kaj ili decidis fondi en Ljubljana esperantistan organizaĵon. Tiu grupo preparis regularon kaj transdonis ĝin al la polico, kiu aprobis ĝin en la monato Septembro 1921 kaj permesis fondi la organizaĵon.

Laŭ tiuj antagaĵoj¹ la preparkomitata kunvokis la fondkunvenon de ESPERANTA KLUBO LJUBLJANA, kiu okazis la 3-an de Decembro 1921 en la salono de la Urbdomo. La fondkunvenon ĉeestis 30 personoj el la plej diversaj medioj. La partoprenintoj konfirmis la regularon, kaj elektis la unuan estraron de la Klubo.

Kiel prezidanto estis elektita Danilo Herkov, financa oficisto, ano de la preparkomitato; kiel vicprezidanto Ing. Tomo Knez; kiel sekretario Jerko Jurinac; kasistino Pavla Furlan, oficistino; en la komitaton eniris Zvonimir Bernot, instruisto; Josip Kobal kaj Miha Mušič, komercisto. Kiel revizoroj estis elektitaj Iza Prijatelj kaj Josip Kuralt. La ĉefkunveno decidis tuj okazigi la unuan publikan Esperanto-kurson.

La kurso estis malfermita jam la 7-an de Dec. 1921. en tiama komerca lernejo en Kongresni trg. Lerneja ĉambro tute pleniĝis de geanoj kaj de novaj interesiĝantoj. La kurson gvidis la kluba prezidanto laŭ la jam malfacile trovebla lernolibro de Koser. Inter aliaj estis en tiu kurso, kiu daŭris ĝis Aprilo 1922, Kazimir Budna, Pavla Furlan, Jerko Jurinac, Tomo Knez, Josip Kuralt, Miha Mušič, Iza Prijatelj, Darinka Topolovec, Jože Kozlevčar.

Fragmento el: Al la venko: historiaj eventoj dum 35 jaroj de esperanto-movado en Ljubljana / Jože Kozlevčar. - Ljubljana: Esperanta societo Ljubljana, 1956. str. 6. *J.J.*

¹ Preseraro: atingajoj

Marjeta Longyka: **Pri pasjih peĉinah**

Listov odpadlih vetrc ne viha,
žuželke in ptice molĉe.
Ĉas je obstal sredi diha.
Tiŝina.

Smo sami na свету –
macesni, meglice in jaz?

Marjeta Longyka: **Vĉasih poboŝam kako drevo**

Vĉasih poboŝam kako drevo.
Najljubŝi so bori
s krĥkim slojnatim lubjem.
Diŝeĉi so, neŝni in mehki.

Vĉasih objamem kako drevo.
Ta krotka ĉuteĉa bitja!
V njihovem risu toplote
rosijo na nas blagoslov.

Marjeta in Tomaŝ Longyka: **Osemnajsterokraka zvezda**
(hĉerki Anji za 18. rojstni dan)

Le kaj se tam v daljavi nam svetlika -
sta v tem ŝarenju angel, vila skrita?
Ne, nova zvezdica gre prek zenita,
s svetlobo biserno se v noĉ dobrika.

Prihaja bliŝje svetla, ĉudovita,
kot ognjemet slasti, veselja kres,
kot mavrica je njen deviŝki ples -
in ŝe v vesolja nova se pomika.

Ĉemu to beganje v vesoljsko noĉ?
Kaj pa ĉe zvezda naŝa druŝbo iŝĉe?
Ozvezdje, ki bi ji dajalo moĉ?
Planet, ki bi se v njeno ujel tiriŝĉe?

Da zvezdica na poti ne omaga,
naj sreĉa ji, razum, srce pomaga!

Marjeta Longyka: **Ĉe la danĝeraj rokoj**
(esperantigis Tomaŝ Longyka)

Foliojn falintajn vento ne faldas.
Silentas insekto kaj bird'.
Tempo spirmeze ekhaltas.
Trankvilo.

Ĉu ni solas en mondo –
larikoj, nebuletoj kaj mi?

Marjeta Longyka: **Fojfoje mi arbon karesas**
(esperantigis Tomaŝ Longyka)

Fojfoje mi arbon karesas.
Plej ŝatatas la pin'
kun rompiĝema tavoloŝa ŝel'.
Ĝi bonodoras, teneras kaj molas.

Fojfoje mi arbon karesas.
Tiu fajne sentantaj estaĵoj!
En aŭro de varmo ilia
jen beno rosetas sur nin.

Marjeta kaj Tomaŝ Longyka: **Dekokpinta stelo**
(al ilia filino Anja okaze de ŝia 18-a naskiĝtago, esperantigis
Tomaŝ Longyka)

Kio en malproksim' al ni briletas –
ĉu ene kaŝiĝas fein' aŭ anĝelo?
Ne, trans zenito iras nova stelo,
ĝi nokte perlalume kaĵoletas!

Alproksimiĝas ĝi en brila belo
kiel artfajraĵo de ĝuo kaj de ĝoj',
dancante virge sur ĉielarka voj'
en kosmojn novajn ŝi formoviĝetas.

Por kio tiu kosma noktvojaĝo?
Ĉu Stelo nia kompanion serĉas?
Stelaron ŝin fortigontan per kuraĝo?
Planedon, kiu en ŝian relon altirota estas?

Survoje Stel' neniam sin lacigu,
feliĉ', prudento, koro ŝin savigu!



Tomaž Longyka je prispeval velik del kulturnega programa

Ko smo se pred mnogimi leti v gimnaziji pri nemščini učili o pesniški miniaturni – pravem biseru nemške poezije – Goethejevem *Wanderers Nachtlied*, smo izvedeli za legendo, morda bajko, o njenem nastanku: Veliki pesnik naj bi jo ob sončnem zahodu z ogljem napisal na steno gorske koče, kjer je prenočil po poletni popoldanski nevihti. *O.K.*



Aŭtoro kaj tradukisto Tomaž Longyka

J.W. Goethe: ***Wanderers Nachtlied***

*Über allen Gipfeln
ist Ruh',
in allen Wipfeln
spürest du
kaum einen Hauch.
Die Vögelein schweigen im Walde.
Warte nur, balde
ruhest du auch.*

J.W. Goethe: ***Popotnikova nočna pesem***
(poslovenil: Tomaž Longyka, 12/2009)

*Na nebu in v górah
spokoj,
zgoraj v krošnjah
nocoj
sapice ni.
Sleherni ptiček je v gozdu zaspal.
Le čakaj, zaspal
boš kmalu še ti.*

J.W. Goethe: ***Vojaĝula noktopoemo***
(esperantigis: Tomaž Longyka, 12/2009)

*Super montaro
silent'.
En arbokronaro
la vent'
ne spiras plu.
Ĉiuj birdoj dormantas. Kaj baldaŭ,
atendu, vi ankaŭ
ripozos sen bru'.*

Strokovni
kotiček

Predavanje o razvoju jezika

V prejšnji številki Informacij smo poročali o kongresu nemške esperantske zveze GEA v Münstru. Omenjeno je bilo tudi predavanje dr. Detleva Blankeja o razvoju esperanta kot živega in uporabljanega jezika. Tema je zanimiva in koristna za boljše, pa tudi za manj dobre, poznavalce jezika. Želeli bi vzpodbuditi razpravo, ki bo pomagala bolje obvladati esperanto in prispevati k bolj kakovostnemu poučevanju.

Avtor nam je ljubeznivo dovolil ponatisniti gradivo za udeležence nemškega kongresa ter nam dal na razpolago za študij in razpravo svoj članek v nemščini, ki je bil podlaga za omenjeno predavanje (glejte navedbo vira na koncu besedila). Zainteresiranim bomo poslali ta članek v elektronski obliki.

Bralce še opozarjamo, da je gradivo s kongresa povzete, ki je pomagal spremljati predavanje in utegne biti na nekaterih mestih nejasen brez poznavanja baznega članka. *Opomba ur.*

Ĉu Esperanto evoluas, ŝanĝiĝas ?

1 Kelkaj kaŭzoj de skeptikeco pri Esperanto

Ĉefaj miskomprenoj

- Lingvoprojekto kaj lingvo

- Lingvo kaj kulturo
- Lingvo kaj lingvoŝanĝo, lingva evoluo
- Lingva relativismo (Sapir-Whorf-hipotezo)

2 Prognozo de Ferdinand de Saussure

Ferdinand de Saussure (1857-1913), la fama frato de René de Saussure (1868-1943), substrekante, ke ĉiuj lingvoj ŝanĝiĝas, la saman prognozis por Esperanto:

“Tio (la principo, ke lingvoj ŝanĝiĝas-DB) estas tiom ĝusta, ke tiu ĉi principo devas montriĝi ankaŭ ĉe la artefaritaj lingvoj. Tiu, kiu kreas lingvon, ĝin tenas en sia mano tiom longe, kiom ĝi ankoraŭ ne estas uzata. Sed ekde tiu ĉi momento, kiam ĝi plenumas sian taskon kaj estas ĝenerale uzata, ĝi elglitas el la kontrolo. Esperanto estas tia provo. Se ĝi sukcesus, ĉu ĝi evitus tiun ĝeneralan leĝon? Post mallonga tempo la lingvo verŝajne enirus sian semiologian¹ vivon” (F. de Saussure 1971:111).

3 Zamenhof antaŭvidis lingvo-ŝanĝon

„Krom tio ni ne forgesu, ke la perfektigado de lingvo arta estas ebla ĝis senfineco, ĉar *ĉiun* bonan regulon, bonan formon, bonan esprimon, kiu ekzistas en kiu ajn lingvo, lingvo arta havas plenan rajton aligi al si, ĉian mankon, kiu povus troviĝi en ĝi, ĝi havas la rajton plibonigi kaj ŝanĝi [...]“ (Zamenhof 1992:277-278).

Por Z. lingvo-ŝanĝo = “perfektigado”
(pozitiva aspekto)
(tamen ankaŭ negativa aspekto)
Kio estas “bona”? Kio estas “manko”?
= ambaŭ aspektoj laŭ subjektivaj juĝoj.

4 Esploroj pri lingvo-ŝanĝo de Esperanto

- diversaj studoj kaj skizoj (ekz. Gregor 1986)
- germanlingva disertacio de Benoît Philippe (1991)
- mankas esploroj pri la parolata lingvo (eble nur: Lloancy 1995, Tišljär 1982)

5 Materialbazoj por esploroj

- Zamenhofaj tekstoj (Ludovikito: 35 zamenhof-voluoj, 21 volumoj kun aliaj tekstoj)
<http://katalogo.uea.org/index.php?kateg=pvz>).
- vortaro de la zamenhofa lingvo-uzo (Nomura 1989)
- korpusoj (tekstaroj) Wennergren:
<http://tekstaro.comserchi>, 4,7 milionoj da vortoj en kuntekstoj.

6 Diskutoj en la lingvo-komunumo

- neologismoj
- la “bona lingvo” (<http://www.bonalingvo.org>)
- AdE: ĉu nur observi aŭ interveni?
(<http://www.akademio-de-esperanto.org/>)

7 Faktoroj de lingvoŝanĝiĝo laŭ origino

7.1 lingvo-internaj faktoroj

i.a. efikoj de

- la fiziologia strukturo kaj aplikokutimoj de la artikulacia aparato
- emo al ekonomia esprimo (malmulte da forto – multe da rezulto)

7.2 lingvo-eksternaj faktoroj

i.a. efikoj de

- lingvaj kontaktoj, interfero
- subtavolaj kaj supertavolaj lingvoj
- sociologiaj procezoj

8 Faktoroj de lingvoŝanĝo laŭ efiko

- 8.1 • impulsaj faktoroj
8.2 • bremsaj faktoroj

9 Impulsaj faktoroj

efikas movige, impulse al ŝanĝoj

- (1) Zamenhof “nur” iniciatis, donis la unuan impulson, poste pluimpulsadis:
- modeloj
- kreo de revuo (“La Esperantisto”) ktp.
- komencoj de lingvo-komunumo (adresaroj)
- (2) Skizo invitas al kompletigo
- (3) Malsamaj bezonoj por novaj nocioj kaj iliaj nomoj (ĉiutaga, faka, literatura/arta lingvoj)
- (4) Strebo al internacieco
- (5) Strebo al vortforma travidebleco, ekz.
• analogio
• “logiko”
• sistemeco
• lingva ekonomio
• redundo
ktp.
- (6) Influo de gepatraj lingvoj – interfero (vortfarrado, sintakso, stilo, frazeologiaĵoj, prononco)
- (7) Rolo de amaskomunikiloj (radio, periodaĵoj, reto, elektronikaj konserviloj)
- (8) Reformdiskutoj

10 Bremsaj faktoroj

efikas bremse, neŭtralige, konserve, malrapidige, stabilige

- (1) Specifa funkcio de Eo kiel internacia komuni

¹ Semiologio = scienco pri sistemoj de signoj, lingvo = signo-sistemo.

- kilo
- (2) Rolo de Zamenhof
- lingva aŭtoritato
 - modeloj
- (3) Influo de personoj
- per tekstoj
 - paroladoj
- (4) Fiksado kaj kodigo de la normo (1905: la Fundamento)
- (5) Kvazaŭnormoj k ilia instruado
- zamenhofaj tekstoj
 - PIV
 - PAG
- (6) Ideal-orientita konservativismo (Nur “facila” kaj riĉa lingvo sukcesos)
- (7) Volo al komunikado (esti komprenata)
- (8) Konscia uzo de la lingvo (normkonscio)
- (9) Rolo de la lingvo-kultura institucio (AdE)
- (10) Superrego de skribitaj tekstoj

Inter la malsame kaj ofte kontraŭe efikantaj faktoroj de impulsoj kaj bremsadoj realiĝas la lingvo-ŝanĝo. Fine kaj decide reguligas la praktiko.

11 Ekzemploj de lingvo-ŝanĝoj en la leksiko

11.1 Kvanto

		<u>radikoj</u>
1887	La Unua Libro	904
1894	La Universala Vortaro	2.599
1910	Kabe	5.000
1930	PV	6.900
1970	PIV	15.250
2005	NPIV	16.780

Kunmetaĵoj, ekz. “x-akv-x” (trinkakvo, akvomelono..., x = radiko)

Wüster	1923	116
PIV	1970	34
Krause	1999	99
NPIV	2005	48

11.2 Fonologiaĵoj / prononcfaciligoj

ĥ→k

<i>ĥameleono</i>	<i>kameleono</i>
<i>ĥemio</i>	<i>kemio</i>
<i>teĥniko</i>	<i>tekniko</i>

reduktoj de radiko-longo

<i>proletario</i>	<i>proleto</i>
<i>meteorologio</i>	<i>meteologio</i>
<i>rezultato</i>	<i>rezulto</i>
<i>spontanea</i>	<i>spontana –sponta</i>

(slange: s’luton, sal’)

11.3 Arkaismo – neologismo

<u>L.L. Zamenhof</u>	<u>nun</u>
<i>signo de poŝto</i>	<i>poŝtmarko</i>
<i>animpremiteco</i>	<i>angoro</i>
<i>deino</i>	<i>diino</i>
<i>pafilego</i>	<i>kanono</i>

<u>Antoni Grabowski</u>	<u>nuntempe</u>
<i>mirrakonto</i>	<i>fabelo</i>
<i>ŝajnkaŭzo</i>	<i>preteksto</i>

11.4 Specialaj leksikaĵoj

11.4.1 Landaj realaĵoj

<i>bakŝiŝo</i>	trinkmono en Oriento
<i>getao</i>	japana ligna sandalo
<i>perestrojko</i>	sovetia reformpolitiko
<i>dezibao</i>	[maoisma] murgazeto en Ĉinio

11.4.2 Fakaj leksikoj

(a) komputiloj (komputero, komputoro...)

stori

durdisko

(b) matematiko

asimptoto (slov. *asimptota*)

bazvektoro (slov. *bazni vektor*)

(c) medicino

funga toksigo (slov. *zastrupitev z gobami*)

kardiopatio (slov. *bolezni srca*)

11.4.3 Politika leksiko

socialfaŝismo

disidento

libera merkato

Eŭropa Unio

orienta-okcidenta konkurenco

kosmonaŭto – astronauto

sputniko – satelito

kosmoŝipo – spacŝipo

11.4.4 Esperantismoj

kabei

desuprismo

samideano

raŭmismo

La Civito...

krokodili

(Melnikov 2004, 2010)

11.5 Sinonimoj

<i>delegitaro</i>	<i>delegacio</i>
<i>metalfadeno</i>	<i>drato</i>
<i>antaŭparolo</i>	<i>prefaco</i>
<i>superakviĝo</i>	<i>inundo</i>
la kazo mal-	
<i>malbona</i>	<i>mava</i>
<i>malriĉa</i>	<i>povra</i>
<i>maljuna</i>	<i>olda</i>
<i>malkonfirmi</i>	<i>dementi</i>
<i>malsanulejo</i>	<i>hospitalo, kliniko, sanatorio, ambulatorio</i>

specifaj fakvortoj

<i>kapdoloro</i>	<i>cefalalgio</i>
<i>neĝborulo</i>	<i>galanto</i>
<i>bestkuracisto</i>	<i>veterinaro</i>
<i>okulkuracisto</i>	<i>oftalmologo</i>

11.6 Vortkreado – eluzo de la potencialo

Prefiksoj kiel radikoj

eki
disa
male, malo

Sufiksoj kiel radikoj

ilo
inda, indi
ema, emi, emo

Rekta verbigo de adjektivoj

bona – boni
grava – gravi
granda – grandi

Rekta verbigo de substantivoj

trajno – trajni
milito – militi
biciklo – bicikli

Rekta verbigo de prepozicioj

por *pori*
kun *kuni*
kontraŭ *kontraŭi*

Adverboj anstataŭas sintaksajn esprimojn

ĉe la fino de la libro *librofine*
dum la tago *tage*
per la trajno *trajne*
inter la kulturoj *interkulture*
sur tablo *surtable*

11.7 Semantikaj ŝanĝiĝoj

11.7.1 Kresko de polisemio/plursignifeco

<u>Kabe (1910)</u>		<u>NPIV (2005)</u>
<i>bela</i>	1	7
<i>granda</i>	2	4
<i>libro</i>	1	8
<i>tero</i>	3	14
<i>tranĉi</i>	1	6
<i>skribi</i>	1	7

11.7.2 Redukto de polisemio/plursignifeco

<i>humoro</i>	1. kutima aŭ okaza stato de la psiko, 2. sento pri komiko (nun: <i>humuro</i>)
<i>proceso</i>	1. juĝafero, 2. sinsekvo de aferoj (nun: <i>procezo</i>)
<i>publikigi</i>	1. fari publika, 2. verki ion (nun ankaŭ <i>publici</i> [en gazetoj])
<i>respondi</i>	1. doni respondon, 2. <i>respondeci</i> (nun ankaŭ <i>responsi</i>)

la kazo de -ujo

1. ujo:	<i>monujo</i> (stabiliĝis)
2. arbo:	<i>ĉerizujo</i> (malofte)
3. lando:	<i>Germanujo</i> (superregas -io)

<u>Google</u>	<u>23.1.2009</u>	<u>13.5.2011</u>
<i>Bulgario</i>	95,5 %	90,5 %
<i>Germanio</i>	89,3 %	93,8 %
<i>Francio</i>	89,2%	91,6 %
<i>Rusio</i>	92,9 %.	92,6 %

sed:
Esperantio 22,06 %

11.7.3 Esperantismaj konotacioj (kunsignifoj)

kongreso, kongresumi...
stelo
Centra Oficejo
estraro
komitato
skismo
komencanto
himno
kotizo
fina venko
verda

11.8 Stiloj

Gravaj stilrimedoj

- frazeologismoj, proverboj (Fiedler 1999)

- vortludoj (de Raymond Schwartz: Lloancy 1985)
- retorikaj stilfiguroj en liriko (Dahlenburg 2006)

Funkciaj stiloj

- ĝenerala (ĉiutaga) lingvo
- literatura
- administra
- gazetara
- [junulara]

12 Ĉu eblas, dezirindas aŭ eĉ necesas influi la evoluon de Esperanto?

Respondo dependas de

- lingvopolitika konscio (ekz. por EU)
- konscio pri la mankoj
- konscio pri komunikadaj postuloj al Eo
- lingvokultura vidpunkto (Franca Akademio – AdE)
- kontento pri limigita rolo, agrabla tempopasigilo

Junaj naciaj lingvoj instruas

- ke eblas
- ke dezirindas, eĉ necesas

Konklude por Eo

- (a) Oni studu la spertojn de junaj naciaj lingvoj.
- (b) Planlingvo troviĝas sub pli da premo ol naciaj lingvoj kun teritorioj, ŝtataj, esploraj, instruaj kaj aliaj instancoj, pro tio necesas aktivaj lingvo-kulturaj instancoj (AdE, TEC...).
- (c) Necesas ellaboradode principoj kaj ilia apliko kaj por la normigo aparte de la faka leksiko.

Literaturindikoj en:

Detlev Blanke (2010): Sprachwandel im Esperanto – gezeigt an Beispielen aus der Lexik. En: Kristin Reinke, Carsten Sinner (2010, Red.): *Sprache als Spiegel der Gesellschaft. Festschrift für Johannes Klare zum 80. Geburtstag*. München: peniope – Verlag Anja Urbanek, p. 51-77. (teksto haveblas ĉe detlev@blanke-info.de)

Detlev Blanke

Iz dejavnosti ETD	Obvestila
----------------------	-----------

Prošnja za pomoč

Esperantsko turistično društvo Ljubljana želi najeti ali kupiti po ugodni ceni prostor s sanitarijami za društveno dejavnost in arhiv. Prostor naj bo v Ljubljani in dosegljiv z mestnim avtobusom ter z možnostjo parkiranja. Prosimo vas, da nam ga pomagata najti. Več informacij o pogojih lahko dobite po telefonu 041 905 488. *Nika Rožej*

Osebne znamke ETD

V skladu s programom dela je Izvršilni odbor društva določil besedilo in idejno zasnovo za naročilo osebnih znamk pri Pošti Slovenije. Pri besedilu je bila dilema zaradi večkratnega spreminjanja imena esperantskega društva v času od nastanka do danes. Izbrano je bilo nevtrarno in najbolj zgovorno ime organizacije. Likovna zasnova naj poudari značilnost mesta Ljubljana in esperantskega gibanja. Izdelata naj se dve znamki in sicer za domači promet v slovenskem jeziku, za mednarodni promet pa v esperantu.

Oblikovanje znamk smo zaupali arhitektki mag. Suzani Duhovnik, ki ima že veliko izkušenj s tega področja dela. Izdelala je »pro bono« več osnutkov, izmed katerih smo izbrali primerne za obe znamki z variacijo barv okvira in napisa na njem. Delno težavo nam je povzročila Pošta Slovenije, ker pri osebnih znamkah ni na razpolago belega okvira z zelenim napisom vrednosti in loga Pošte. Izbrali smo torej beli okvir s črnim napisom za vrednost A ter zeleni okvir z belim napisom za vrednost C.



Pri osebnih znamkah pošljemo sliko in izberemo okvir

Nabavna cena osebnih znamk je približno za 0,50 EUR višja od rednih znamk iste vrednosti pri nakladi do 1.000 kosov, pri večji nakladi pa je 10% popusta. Ker nismo vedeli, kakšno bo povpraševanje po naših osebnih znamkah, smo se odločili za prvo naklado 200 kosov znamk A in 100 kosov znamk C. Dotisk je brez posebnih stroškov možen v lotih po 20 kosov. Glede na veliko zanimanje za znamke med člani ETD in ZES že na dan predstavitve znamk bo verjetno že kmalu prišlo do ponaročila, le količino je treba oceniti tako, da ne bo preveč znamk ostalo v zalogi. *O.K.*

Priznanje Fani Rižnar

Izvršilni odbor ETD je sprejel sklep, da ob praznovanju 90. obletnice organiziranega delovanja esperantskega gibanja v Ljubljani podeli javno priznanje gospe Fani Rižnar, sedanji članici Nadzornega odbora in bivši predsednici društva. V utemeljitvi za to pomembno in častno priznanje, ki ohranja pričevanje o dolgoletnem

požrtvovalnem delu in velikem prispevku za obstoj in razvoj društva, so med drugimi navedene tudi svojstvene zasluge gospe Rižnar kot so na primer skrb za sodelovanje s turističnimi organizacijami na ravni države in na lokalni ravni, sodelovanje z zamejskimi in tujimi esperantisti, bogastvo idej in pobud za aktivnosti, velika zagnanost in hitrost pri izvrševanju načrtovanih nalog, neposrednost v komuniciranju itn. Zlasti pomembno delo je Fani Rižnar opravila v obdobju po letu 2000, ko je bila gonilna sila bitke za ohranitev in ponovno oživetev ETD Ljubljana.



Oblikovanje priznanja: Matej Demšar in Ostož Kristan

Izvršilni odbor ji izraža v imenu članstva društva in mnogih drugih somišljenikov iskreno zahvalo za prispevke k esperantskemu gibanju v njeni že 56 let trajajoči društveni dejavnosti ter upa, da bo tudi v bodoče vključena v čim več naših aktivnosti. *O.K.*

LJUBLJANSKI ZMAJ
GAZETO DE ESPERANTA TURISMA SOCIETO LJUBLJANA

V prejšnji številki Informacij je zaradi miselne napake urednika izpadlo poročilo o izidu 13. številke Ljubljanskega zmaja, čeprav časovno za to ni bilo nobene ovire. Zamujeno popravljamo tokrat, za neljubi spodrsrlaj pa se bralcem iskreno opravičujemo. (*Opomba ur.*)

Povzetka vsebine zadnjih dveh števil *Ljubljanskega zmaja*, mesečnega glasila ETD Ljubljana:

- Številka 13 – marec-maj 2011: zapisnik občnega zbora ETD, program dela za leto 2011, aktualne informacije o dogodkih v svetu oziroma najave, obvestilo o znamkah Železničarskega esperantskega društva Maribor ob 20. obletnici samostojne Slovenije.
- Številka 14 – julij-december 2011: vabilo na proslavo ob 90. obletnici esperantskega društva Ljubljana, opis in popis dejavnosti ETD zadnjih 10 let, važne domače novičke, ostali dogodki doma in v svetu, kuharski kotichek z receptom in malo zgodovine.

Mednarodno
sodelovanje

Dogajanje v svetu Esperantujo

Plej necese estas koni la ĝustan tempon agi



Estante komercisto, pri reklamado mi ja scias, sed pri reklamado de Esperanto mi bezonis investi tempon kaj monon. Mia unua sperto estis en 2002 en Danio kaj sekvis Belgio, Francio, Germanio, Italio, ktp; entute 13 landoj. Ĉiam, ion novan mi lernis survoje: pli altiras konkretaĵoj, necesas laboro de grafikisto kaj

reklamisto, taŭgas mallongaj tekstoj, ktp.

Mia celo estas veki la amaskomunikilojn, ĉar sen ili ni ne povas esperi pri la fina venko. Konsekvenco de tio estos la konkero de la popolo, kiu siaflanke influos la politikistojn.

Post 9-foja reklamado en Le Monde, en junio 2010 mi negocis la aperigon de novaĵo pri lingva malegaleco. Tamen ilia reprezentanto, S-ro Meixner, diris, ke intereso ne estis. Mi, do, planis prelegvojaĝon al 9 francaj urboj por varbi reagantojn al la Z-taga tutpaĝa anonco.

Post prelego en Parizo mi veturis al Vannes, kie mi subite malsanis. Mi telefonis al mia edzino: "Mi revenos, ĉar mi ne povas spiri". Ŝi respondis: Esperanto-Movado estas pli grava ol via vivo, do daŭrigu. Sed mi ne povis teni min kaj kiam mi alvenis Osakon, ne povis moviĝi.

La publiko serioze kaj sincere aŭskultis. Post apero de la reklamo, mi ricevis centon da leterkopioj al Le Monde; verŝajne ĝi ricevis pluroble pli ol mi. Al la publika intereso, ilia respondo estis ignorado. Mi sentis, ke mi staras antaŭ giganta kaj fortika muro pro desupra

premordoj kaj ke ili estis monavidaj... sed 'dissaltos la obstinaj baroj per la sankta amo disbatitaj'.

Kio estas la rezultoj de la agado en ĉi tiu jardeko? Inter la negativaĵoj menciendas, ke en la komenco la reklamado ne sufiĉe profesiis: ne persvada enhavo, tro da tekstoj, ne konkretaj informoj, ne taŭga aspektigo. Plie, mi nur 1-foje reklamis en 1 lando... ja ripetado estas esenca.

Kiam aperis la anonco en Rzeczpospolita en 2004, okazis lunĉdebato en Varsovio kun la litovaj kaj polaj EU-parlamentanoj. Tiam Bronisław Geremek, EU-vicprezidanto kaj eksa ministro pri eksterlandaj aferoj en Pollando, rifuzis ĉeesti kaj private renkonti min, ĉar li konvinkiĝis, ke Esperanto ne povus venki. Tamen en majo 2008 mi sukcesis tuŝi lian koron per anonco en 'Le Monde'. Tiam EU rifuzis utiligi la polan en sia retejo kaj post kunveno kun Seán Ó Riain kaj Jozef Reinvart li kunorganizis la debaton 'Esperanto, ĉu amiko aŭ malamiko de multlingvismo?' por ĉiuj parlamentanoj la 14-an de julio. Tragiĉe li mortis aŭtakcidente survoje al Bruselo. Li estis konvinkita, ke plejparto el la EU-parlamentanoj kontraŭas la anglan dominadon kaj ke estas granda manko de scioj kaj antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto. De liaj observoj ni profitu!

La anoncoj vekis homojn kiel Isabel Castro, direktoro de Eurimages aŭ la urbestro de St-Aignan de Grand Lieu, kiuj montris intereson pri la lingvo kaj la Movado. Post aperigo en La Repubblica en 2003, 8 italaj parlamentanoj promesis al Itala E-Federacio proponi la utiligon de E-o en la Eŭropa Komisiono. Unu el ili, Emerenzio Barbieri, dum la nuna parlamenta mandato prezentis leĝproponon pri nia lingvo.

Ĉu ankoraŭ menci, ke la hejmpaĝoj de la landaj asocioj en la anonclandoj estis pli vizitataj sekve de la reklamoj? Aŭ ke pliaj lernantoj aperis en la kursoj? La slovaka diplomato Josef Reinvart sendis kopiojn de la aperaĵo en SME en 2004 al ĉiuj slovakaj ambasadejoj tra la mondo kaj oficistoj de la ministerio pri eksterlandaj aferoj.

Ĉu reklami estas vana elspezo? Certe ne, sed investo en la estonteco, ĉar se EU agnoskos Esperanton, la mondo tuj sekvos.

Esperanto estas varo same kiel Coca-Cola, McDonald's, ktp. Se ni ripete montras la solvon al la nuna lingva malegaleco, ni havos la ŝancon sukcesi, ekzemple per samtaga reklamado dum unu jaro ĉiumonate en la 27 EU-landoj. Nun oni simple cedas antaŭ la ĝeneraliĝo de la angla. Nia misio estas veki la homaron de tiom vasta soporo, imitante Ludovikon. Mi pensas, ke tia senprecedenca agado povus utili kiel brulŝnuro. Ni ne perdoŝ ĉion. Certe io sekvos. Ni bezonas investi por sukcesi. Ĉiu organizo kaj kompanio progresas aŭ regresas. Ne ekzistas horizontala flugo.

Ĉi kampanjo okazu kadre de pli vasta strategio, kio inkluzivu ekzemple, ke LA konigu la reklamojn al iliaj landaj kaj EU-parlamentanoj, varbado de kursanoj aŭ

aliaj agadoj laŭ la landaj kondiĉoj. Ankaŭ tio altiros la amaskomunikilojn kaj Esperantujo vigliĝos.

Mia unua reklamo kostis pli ol EUR 70.000 kaj la prezo trioniĝis kondiĉe al 10-foja ripeto. La nuna UEA-havaĵo larĝe sufiĉas por tio. Kion la Esperantistaro opinias?

Mi dankas al Seán Ó Riain, Renato Corsetti, la estro de Landaj Asocioj kaj tradukistoj pro la valora kaj sindona apogo dum nia febra kontaktado.

Majstro Hidemaru Degučĉi, kiu sugestis en 1923 adopti Esperanton al Majstro Onisaburo Degučĉi, diris: Homoj ĝenerale alkroĉitaj al la nuno, forgesas la pasintcon kaj ignoras la estontcon. Ni, do, kuraĝe agadu por ke 'la nepoj nin benu'.

Etsuo Miyoshi

Na spletni strani ZES smo 15.12.2010 objavili naslednjo vest:

Tutpaĝa anonco pri Esperanto en Dnevnik

Hodiaŭa taggazeto Dnevnik aperigis tutpaĝan anoncon pri Esperanto, kiun mendis konata esperantisto s-ro Etsuo Miyoshi, la prezidanto de la japana kompanio Swany.

TIBOR SEKELJ – la kolektanto de ĉielarkoj

"Kion? . . . Ĉu ĉielarkojn vi kolektas?" demandis Sita kun la okuloj larĝe malfermitaj.

"Kion? . . . Jes, kompreneble, hm, ĉielarkojn. Ĉu io stranga pri tio?"....

La novelo *Kolektanto de ĉielarkoj* estis mia unua renkonto kun Tibor Sekelj. Kaj ravis min! Ravis min la ideo rakonti pri ĉielarkoj, mi imagis lin simple kaj elkore parolanta kun la dekjara nigrokula knabino Sita dum longa trajnvojaĝo en iu fora lando, ravis min la maniero de lia rakontado, la esprimovaj priskriboj, la simpla, bela lingvo... Mi certis, ke la aŭtoro estas escepta homo.

Multajn jarojn poste mi ekkonis lin persone. Dum la jugoslavia kongreso en Škofja Loka en la jaro 1983 grupo da miaj gelernantoj prezentis kulturan programon. Post la fino ni kune sidis en iu angulo kaj malstreĉitaj post la bona sukceso de nia prezentado vigle babilis kaj ridis. Alproksimiĝis al ni viro, malaltstatua, kun okuloj ridetantaj kaj ĉarma griza barbeteto. "Do, viaj estas tiuj kokidoj! Mi gratulas al vi! Pardonu, Tibor Sekelj mi estas." "Kia honoro, la kolektanto de ĉielarkoj mem!" mi respondis. Estis ĉio, kion mi tiumomente sciis pri li.

Unu jaron poste mi eklaboris por li en Subotica. Sekvis verŝajne plej interesa jaro de mia vivo. Plej enhavoriĉa, plej intensa, plej emociplena, plej instrua...



Samidenao Lajĉo Imriĉ

En novembro mi vizitis la tombon de Tibor Sekelj en Subotica. Akompanis min Lajĉo Imriĉ, malnova esperanto amiko el "mia subotica tempo".

La 22-an de marto ĉi-jare mi prelegis pri la vivo kaj verko de Tibor Sekelj en la Maison des Associations en Ĝenevo laŭ la invito de Esperanto-Grupo *La Stelo*. Gitarajn interludojn faris esperantisto Francois Stride, la plej juna profesoro en ĝeneva konservatorio – honore al Tibor li elektis muzikon el sudamerikaj landoj.

Zdenka Rojc



La tombo de Tibor Sekelj en Subotica

Obvestila in pozivi	Za somiŝljenike ter ĉlane ZES in ETD Ljubljana
------------------------	---

Ĉlanarina ZES

Za leto 2011 znaŝa letna ĉlanarina ZES 12 € za zaposlene, 6 € za ŝtudente, upokojence in brezposelne ter 0 € za mlade do 18. leta. Enaka viŝina ĉlanarine je predvidena tudi za naslednje leto.

Ĉlanarino za leto 2011 in 2012 ter morebitne zaostale ĉlanarine ter prostovoljne prispevke lahko plaĉate na sestankih ali na transakcijski raĉun ZES pri NLB ŝt. SI56-0201-5001-2704-490 z navedbo namena plaĉila »priimek, ĉlanarina in ustrezno leto oz. obdobje«. Po 1. januarju 2012 morate uporabiti nove obrazce UPN, ker stari (posebne poloŝnice, BN 02) ne bodo veĉ veljavni. O.K.



Uspeŝna operacija oĉes

Nekaj dni po naŝem skupnem proslavljanju jubilejev in druŝenju ob Zamenhofovem dnevnu v Ljubljani je bil predsednik ZES mag. Janez Jug operiran na oĉeh. Z laserskim posegom so mu odstranili sivo mreno in korigirali vid. Ŝe istega dne je zapustil bolniŝnico in se vrnil domov z bistveno izboljŝanim vidom in niŝjo dioptrijo. Predsednik ZES potrebuje nekaj tednov domaĉe nege in kontrolne preglede ter zlasti poĉitek za preutrujene oĉi. Ŝelimo mu trajno izboljŝanje vida, da bo lahko brez ŝkode za svoje oĉi opravljajl sluŝbene naloge ter naŝel moĉ in ĉas tudi za druŝtveno delo. *IO ZES*



INFORMACIJE / INFORMOJ izdaja / eldonas Zdruŝenje za esperanto Slovenije / Slovenia Esperanto-Ligo, Ŝtefanova 9, SI-1001 Ljubljana, Slovenija / Slovenio. <http://www.esperanto.si>. Matična ŝt. / kodnumero 5058384. ID za DDV / n-ro por AVI: 93737777. Poslovni raĉun / bankkonto: IBAN SI56 0201 5001 2704 490 pri / ĉe Nova Ljubljanska banka d.d.. (Swift-kodo: LJBASIX). Uredil / redaktis mag. Ostoŝ Kristan.